

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Niaj Planoj

([KK]=nia kutima kunvenejo, nome Kanagawa-Kenmin-Senta, proksime de la Stacidomo Jokohama)

*jun.16 [KK] Hama-Ronda Vespero

Esperantlingva prelego de s-ino Ueno Yuriko, kun la titolo je "Partopreninte en la 9a Tutamerika Kongreso de Esperanto". Tiu kongreso okazis en Kubo en februaro 2018.

*jul.28 [KK] Speciala klaso

(kvazaŭ Hama-Ronda Vespero) konatiĝo kaj interparolo kun belgaj esperantistoj, s-ro Bart Demeyere kaj lia 18-jara filo Thomas. Ili dum japana vojaĝo tranoktos ĉe s-ro Tanigawa de nia rondo. Legu ilian sinprezenton en p.2, kaj la rezulton de lia komputila programo ViVo.

*sept.1 [KK] Prezento de someraj spertoj

Niaj rondanoj parolos pri sia sperto en la somero, ĉu pri Esperanto, ĉu pri aliaj temoj.

Pri "sonĝo" el leganto

Jena letero el Ĉinio venis rilate artikolon en la lasta numero. Ni daŭre atendas viajn reagojn. (red)

Mi treege dankas vin pro la interesa gazeto, karaj geamikoj.

Kiam mi legis la artikolon "Ĉu sonĝo havas koloron? odoron?" en la numero 337 de la gazeto "Novaĵoj Tamtamas", mi rememoras, ke kiam mi estis infano, mi loĝis en kamparo de la provinco Zhejiang kaj mi ofte sonĝis nokte. En la sonĝoj mi ofte flugadis super verdaj montaroj kaj teraskampoj. Ĉiufoje kiam mi svingis miajn manojn kaj mi ekflugis, sed ĉiufoje kiam mi vekigis, mi trovis, ke mi kuŝis en la lito.

Ji Yingeng

Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj (kutime en [KK])

*Fundamentaj Kursoj en sabato

de la 12a de majo ĝis la 21a de jul., gvidate de Doi Ĉieko. Eklernis 1.

*Regulaj Klasoj en sabato

(1) Klaso "Eseoj", por legi "Tamen ĝi moviĝas!" gvidate de Doi Hirokaz

(2) Jokohama Salono. 2 fojojn monate oni legas "Mondo de travivaĵoj", 1 fojon - libera frazfarado; kaj alian fojon - tradukado laŭ sia plaĉa fonto

(3) Daŭriga kurso, por kursofininto en aprilo, gvidate de Fuse Kentaro

*Regulaj Klasoj en merkredo

(1) Klaso "Belĉielo", por legi "Punkuino", gvidate de Doi Ĉieko

(2) Klaso "eriko", por legi "Kuniberto kaj Kilevamba" gvidate de Doi Ĉieko

*Neregula Klaso

Klaso "Belflora", por legi "Punkuino", gvidate de Doi Ĉieko, du fojojn monate

Okazis

*maj.19 [KK] Hama-Ronda Vespero:

japanlingva prelego de socimovadisto, s-ro Nomoto Sankichi, simpatianto de nia lingvo. Li parolis sub la temo: "De la nuntempo al la estonteco; kion mi esperas de Esperanto?", ties resumon vi legu en p.3.



Sinprezento de s-ro Bart el Belgio (ekstrakto)

Mi estas Bart Demeyere el Bruĝo, Belgujo. Vi povas spekti min kiel mi enkondukas Esperanton kaj ĝian tutan gramatikon en 50 minutoj:

<http://konoj.org/sxalmisto/>

Mi estas la programisto de ViVo <www.kono.be/vivo>, kiu estas la plej bona reta serĉilo por trovi tradukojn de/al Esperanto. Danke al Mireille Grosjean, mi aldonis ke homoj sen Japana klavaro povas entajpi la Hiraganan kaj Katakunan. Kaj mi hodiaŭ aldonis serĉadon en PEJVO! ViVo ankaŭ estas diskutejo pri novaj Esperanto-vortoj.

Aldonaj hobiaj estas ludi sociajn ludojn, Argentina tango (mi jam ofte instruis diversajn dancojn), scienco kaj tenisado.

Mia filo, 18-jara, nomiĝas Thomas kaj estas denaska Esperantisto. Li ne povas imagi sian vivon sen Esperanto, kaj en lia amikaro estas

ĉefe Esperantistoj.

Kun mi, li vizitis jam grandan parton de la mondo, almenaŭ kie estas Esperantistoj, ĉefe kie estas Esperanto-familioj, kie la infanoj parolas Esperanton. Nia celo estis helpi Esperanto-familiojn, kiuj ofte ne havas la eblojn por (regule) vojaĝi por renkonti aliajn infanojn kiuj parolas Esperanton. Kaj tio tamen estas necese por montri al infanoj la utilon paroli Esperanton. Multaj (re/ek)parolis Esperanton danke al Thomas. Thomas tre ŝatas viziti familiojn.

Ekzemplo de ViVo

Vidu jenan ekranbildon por scii kia estas la kapablo de la Vikia Vortaro ViVo, en kiu vorto "sakuro" estis la celo.

The screenshot shows a web browser window with the URL www.kono.be/vivo/. The page displays a search result for the word "sakuro". On the left side, there is a navigation menu with various tools and language options. The main content area shows the word "sakuro" with a small tree icon and a "V" icon. Below the word, there is a paragraph of text in Esperanto describing sakuro as a species of cherry blossom. At the bottom, there is a section titled "tradukoj" (translations) listing the word in various languages: anglaj (~o: cherry blossom), belorusaj (~o: cakypa), ĉeĥaj (~o: japonská třešeň, sakura), francaj (~o: cerisier-fleur), germanaj (~o: japanische Kirsche, Sakura-Kirsche), and hungaraj (~o: szakura, vadmeggy (japán)).

Prelego

Prelegis s-ro Nomoto Sankichi: “Kion mi esperas de Esperanto?”

En la 19a de majo, en nia monata kunsido “Hama-Ronda Vespero”, prelegis s-ro Katoo Akihiko, plumnome Nomoto Sankichi, sub la titolo “De la nuntempo al la estonteco; kion mi esperas de Esperanto?”

(de la parolo de s-ro Nomoto Sankichi, resume esperantigis Doi Ĉieko.)

Mi naskiĝis en Tokio, la 30an de novembro 1941. Ok tagojn poste, la 8an de decembro (la 7an laŭ la usona kalendaro) la japana eskadro atakis la usonan pacifikan floton en Perlohaveno de Havajo; tiel komenciĝis la Pacifika Milito: tiam Usono komencis partopreni en la 2a Mondmilito. Tial mi havis grandajn spertojn pro la milito en mia infaneco.

La 10an de marto 1945 okazis grandskala aeratako kontraŭ Tokio. Mi kun la patrino kaj fratineto 10-monata fuĝis en rifuĝejon. Ni restis tie kun amaso da homoj, kvazaŭ senspire; tamen feliĉe finiĝis la atako, kaj do ni eliris el la rifuĝejo. De la ŝultro Panjo demetis la fratineton, kiun mi ricevis. Tiam mi rimarkis ke mia fratineto ne spiras. Verŝajne la bebo ne povis bone spiri kaj ne rimarkite de aliaj perdis sian vivon mallongan. La sperto, la morto de mia fratineto fariĝis la origino de mia vivo. La milito ja pereigas vivojn de la homoj.

La 6an de aŭgusto usona armeo atakis Hiroŝimon per atombombo kaj 3 tagojn poste ankaŭ Nagasako spertis samon. La 15an de tiu monato finiĝis la milito. Komenciĝis la nova vivo. Ni havis novan konstitucion. Ni lernis pri la nova konstitucio: La 9a artikolo de la konstitucio temas pri la forlaso de la milito, kio signifas, ke venis la nova epoko, en kiu homoj ne batalu sed solvu problemojn per interparoloj. La 25a artikolo temas pri la ideo por la bonfarto kaj la 26a artikolo estas pri la ideo por la edukado.

La unuan de aprilo en 1964 mi finis la tutan kurson en la Ŝtata Universitato de Jokohamo kaj fariĝis instruisto en baza lernejo en Jokohamo. Mi ŝatis la laboron kiel instruisto, sed mi tamen ne povis taksu miajn karajn lernantojn per poentoj.

En 1967 japana esperantisto Jui Ĉuunoŝin sinbruligis protestante kontraŭ la sinteno de la

japana registaro rilate al la usona atako kontraŭ Vjetnamio. Tiam s-ro Jui estis 73 jarojn aĝa kaj mi estis 26-jara. Mi volis lerni Esperanton kaj partoprenis en kurso de Japana Esperanto-Instituto. En la kurso mi hazarde renkontiĝis kun mia onklo. Mi eksciis, ke ankaŭ la onklo lernas Esperanton. Parenteze la onklo mortis la 14an de majo ĉi-jare, je la 94a jaraĝo. Inter liaj restantaj aĵoj troviĝis Esperanta Vortaro kaj taglibro skribita parte en Esperanto. Mi metis la aĵojn en lian ĉerkon.

Mi lernis Esperanton en JEI ĝis la meza grado, kaj komencis instrui Esperanton en mia laborejo: baza lernejo.

En 1968 mi finis la laboron kiel instruisto de la baza lernejo, ĉar mi ne volis, nek povis doni poentojn al la lernantoj. Mi vojaĝis en la tuta lando, de Hokajdo ĝis Okinavo. Iam mi iris al Kibuco en Israelo, laboris tie kaj lernis la hebrean lingvon.

En 1972 mi eklaboris kiel oficisto de Jokohamo. Mi laboris en Kotobuki-Ĉoo, la kvartalo de malriĉaj taglaboristoj. Mi tie loĝis kaj laboris kiel konsilisto por sociala bonfarto.



Mi volis aŭskulti homojn en malriĉo kaj iel ŝanĝi kaj plibonigi la socion. Tiam mi konatiĝis kun s-ro Tanigawa Hiroshi kiel sampostenulo, sed mi tute ne sciis, ke li estas esperantisto. S-ro Tanigawa estas membro de Esperanto-Rondo, kaj ankaŭ mi lernis Esperanton. Sed ambaŭ ne sciis unu la alian koncerne de Esperanto.

En 1982 mi eklaboris en konsultejo por infanoj. Intertempe mi konatiĝis kun multaj homoj kaj fakuloj pri la socialaj problemoj kaj faris komunan studon pri la socio.

En 1991 mi fariĝis profesoro de la Urba Universitato de Jokohamo kaj instruis pri la sociala bonfarto. Ĉar tiam la urbo publike varbis instruistojn, mi kandidatiĝis, kaj estis elektita. En la laboro por trovi esencon kaj problemojn de la socio mi praktikis kiel solvi la sociajn problemojn. Mi vizitis lokojn kaj invitis koncernatojn al la universitato kaj tiel komenciĝis memvolaj kursoj.

Por trovi efektivigon de la komunumo mi iris al Okinavo kaj loĝis tie dum 14 jaroj. En la jaro 2002 mi fariĝis profesoro de la Universitato de Okinavo, kaj poste fariĝis la rektoro de la universitato. En Okinavo homoj havas unikan kulturon kaj historion. Kvankam dum jaroj okinavanoj devis havi premitan vivon fare de Japanio kaj terurajn spertojn dum la Dua Mondmilito, ili tenadis sian komunuman vivon. Mi multon lernis de la vivo en Okinavo. Sed pro mia malbona sanstato mi finis la vivon en Okinavo kaj revenis al mia hejmloko Jokohamo en junio 2016.

En Jokohamo mi aliĝis al loka klubo de maljunuloj kaj kunlaboras por plivigli la vivon por maljunuloj.


Ligiĝi kun aliaj per vortoj estas grave por la vivo. Tio estas ja esenco ankaŭ de Esperanto. Ankaŭ mi denove lernu Esperanton. Mi akcentu, “Ĉiuj homoj renkontitaj estas ja gefratoj!”

Beletro

Pasero, el Floroj kaj Birdoj per Bildoj

orig. Miyazawa Kenzi, trad. Sibayama Zyun'iti

Interne de acerfolioj palverdaj,
 korpon knede knedante
 pasero magra karesas siajn plumojn,
 kvar aŭ kvin plumojn ĉe ŝultro ĝi streĉis kontraŭ la suno,
 kiuj similas al konkaj.
 La korpo malstreĉita
 tro magras, kvazaŭ tie ne estus pasero;
 unu branĉon supren, jen lumas ĉielo,
 unu branĉon supren, inter palverdaj acerfolioj
 du branĉojn supren ĝi eliras, saltas sur ĉerizan branĉon;
 blovas vento.
 La pasero sin klinis kvazaŭ mielabelo.
 Tabano saltas malsupren,
 La pasero jam tenas pozon kaptontan;
 sidante tie voras la tabanon.
 La bekoj du fojojn movas sin nur malmulte.
 La pasero supreniras sur branĉon lumreflektan,
 pozas sin kvazaŭ salute,
 jen ĝi soras suben ĝis la tero.



(noto) acero: Temas ĉi tie pri *Acer palmatum*, ŝatata de japanoj pro la folia koloriĝo ruĝen en aŭtuno.
 原作：花鳥図譜 雀（宮沢賢治、「春と修羅・拾遺」より）